

# PENSEO

N-ro 145

Nov./2003

Monata Beletro Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 13-a jaro <http://www.elferno.net/penseo.htm>

## Mikronoveloj de Wang Meng

### Pensulo

Vangĉjo aĉetis ruĝan pilkon. Post kiam li revenis hejmen, li sentis preferon al la blanka. Do li reiris al la magazeno por ŝanĝi la ruĝan kontraŭ la blanka. Tamen post la ŝanĝo, li sentis korinklinon al la ruĝa, kaj li faris alian ŝanĝon de la ruĝa kontraŭ la blanka. Post tio, lia koro alroĉiĝis al la blanka. Kaj li do decidis aĉeti blankan pilkon en la magazeno. Kiam la du pilkoj, blanka kaj ruĝa, metiĝis en la hejmo, li naskis maltrankvilon. Fine li reiris al la magazeno por nuligi la aĉeton de du pilkoj kaj reakiri la monon.

Konsiderinte, ke la nuntempa servado en komercado jam multe pliboniĝis, li aperigis sian artikolon por laŭdi la servadon. Kaj samtempe, li profunde sentis, ke estas tre malfacile por io ajn atingi perfektecon, kaj ke elektado estas granda malfacilo en homa vivo. Pro tio li kovis dubon pri la signifo de la homa vivo.

Liĉjo aĉetis nigaran pilkon kaj ĝin metis en la hejmo ekde tiam. Kvankam Vangĉjo persvadis lin reaĉetis blankan aŭ ruĝan kontraŭ la nigra, tion li ignoris.

Poste, Vangĉjo estis nomata kiel pensulo, kaj Liĉjo kiel politikisto.



tradukis Liu Yi

### Vivjaroj

Dimanĉe kuniĝis kelkaj kunlernintoj, kiuj preskaŭ ĉiuj suspiris senĉese. La unua plendis, “Mia familio loĝas en tre mallarĝa ĉambro. Tri anoj de mia familio okupas nur pli ol dudek kvadratajn metrojn. Jen pro tio mi maltrankviliĝas tiel ke miaj haroj fariĝis blankaj.”

La dua diris, “Dum kelkdek jaroj, mi ne laboras glate kaj laŭdezire, kaj mi ĉiam tenas nebonan rilaton kun miaj superuloj. Jen pro tio mi koleriĝas tiel ke miaj dentoj forfalis tute.”

La tria prenis la temon, “Gravas nek mallarĝa ĉambro nek nebona rilato kun superuloj. Mi pasigis ĉi tiujn kelkdekojn da jaroj por edziĝi kaj eksedziĝi. Ĉiufoje kiam mi implikiĝis en leĝa kazo de divorco, mi fariĝis ankoraŭ pli maljuna. Jen nun mi ne povas rektigi mian dorson kaj mi jam fariĝis ĝibulo.”

La kvara lamentis, “Vi ĉiuj estas pli feliĉa ol mi. Lastjare, mia filino mortis, kaj ĉijare, mia maljuna kunulo forpasis, kaj mi nun suferas je malsanoj en koro, stomako, lieno, hepato kaj tiuj de virinoj... Jen mia vizaĝo plene kovriĝas per faltoj.”



Vangĉjo asertis, “Mi estas la plej feliĉa. Mi loĝas en larĝa ĉambro, mia laboro iras laŭ mia deziro, mi ĉiam tenas bonan rilaton kun miaj superuloj, mia maljuna kunulino traktas min tutkore, ĉiuj anoj de mia familio estas en bona sanstato, kaj mi nek maltrankviliĝas nek ĉagreniĝas. Tamen, rigardu, samkiel vi ĉiuj, mi ankaŭ maljuniĝis.”

elĉinigi Yu Wen

## Dediĉe Al Mia Patrino

Yang Liuhong

En Hongkongo pluvegis je la 27-a de decembro, 1988. Kiam mi konversaciis telefone kun mia patrino, mi informiĝis pri neĝado en Pekino

vetero pluva  
 en tempo vintra  
 min sopirigas senmotive  
 jen al sezono mia—  
 tiuj tagoj por atendi neĝon  
 kaj l' ĝojo ĉe neĝfalo  
 vi certe scias  
 ja kion mi paroli volis  
 kiam mi en pluvo staris  
 akvgute survizaĝe  
 kaj mian stultan agmanieron  
 kiam mi tenis la aŭdilon  
 vi estas am' kaj varmo  
 vi estas diktavola neĝo  
 vi estas ja eterna  
 en ĉiuj lokoj jen sentebloj de mi  
 mi vin konservos  
 vi apartenas sole al mi  
 kiel ajn brua  
 kiel ajn dista  
 ĉu al mi donas neĝon la ĉi-tia vintro aŭ ne  
 profunde mi min trempos  
 profunde mi min enterigos  
 en vian amon  
 en vian varmon  
 en vian dikan  
 tavolon de neĝeroj...



elĉinigi Tong Liang

## Ŝuoj

Ju Guoding

“Kien vi iras?” plenkreskulo demandis al Jang.

Li ne estis la patro de Yang. Tiu, kvar- aŭ kvin-jara, estis trompe kolportita ĉi tien.

“Mi iras pisi,” Jang jam ellernis fabriki mensogon.

“Pisu en sputujon endome,” La plenkreskulo, kiu ne generis siajn proprajn gefilojn, timis, ke Jang eskapis.

Kiam li iris al la hejmo de ŝuisto, vidante la ŝuojn por infanoj, Jang tuj naskis ideon en la menso. Tiuj ŝuoj estis elfaritaj per diverskoloraj feloj, similaj al abstraktaj pentraĵoj: laŭaspekte kalsimila, tigrosimila aŭ monstrosimila.

“Mi volas rigardi ŝu-faradon,” li volis iri tien refoje.

La ŝuisto estas malproksima parenco... kaj plie li ne povos superrigardi Jang dumvive. La plenkreskulo konsentis.

\* \* \*

Haj faris ĉion honeste sen ajna fuŝado. Tamen nuntempe, “honesteco” senutilas. Ĝi helpas nek riĉiĝi nek teni lian edzinon lojala.

Haj insistis pri vartado de Jang kaj la juĝejo favore donis Jang al li per verdikto.

Preskaŭ samtempe, Jang, same honesta kiel sia patro, estis trompe foririgita.

Haj lavis sian vizaĝon per larmoj. Ofte li iris al privata ŝu-vendejo tre malproksima de sia hejmo kaj staris tie ŝtoniĝinte, ĉar li promesis aĉeti tiaspecajn ŝuojn tie. Hodiaŭ la ŝuoj elĉerpiĝis pro bona vendado. Li sentis sennoman ĉagrenon.

“Vi venis ĉi tien multfoje... Ĉu vi volas aĉeti ŝuojn?” Haj skuis sian kapon, faligante kelkajn larmgutojn.

“Tiaspecaj ŝuoj tuj alportiĝos... Ili estas produkto por prova vendado... Mia vendejo estas ununura en vendado de tiaspecaj ŝuoj...” La vendistino ripetis tiujn vortojn multfoje.

Dum ŝia parolado, triciklo alveturis, plena je infanaj ŝuoj kun abstraktaj desegnoj, proksimume ok kestoj da ili.

Haj fikse rigardis tricikliston malŝarĝi kestojn.

La triciklisto malŝarĝis la lastan keston. Jen tre peza kesto!

La kovrilo de la kesto estis puŝmalfermita de knaba kapo. Jang! Surprizite Haj sin ĵetis kriante.

“Mi scias, ke vi certe venas por aĉeti ŝuojn. Vi neiam mensogis,” diris Jang plorante.

elĉinigis **Hongjia**

**RAKONTO PRI FORMIRO**

**Liang Ping**

finfine  
formik' surgrimpas la orelon elefantan —  
mirige la vojaĝo penlabora

la elefant' damninda ne sentemas laŭkutime  
ne koleriĝas la formiko  
ĉar ŝi, en amo, tenas sin alloga

delonge l' elefant' fariĝis jen idolo ŝia  
koncernas tio l' songon de l' formiko  
kaj la kutimon lian fali teren por dormado

sur la herbejo la formiko tiutage  
promenis, ĝoja senkompare  
eĉ ne sciante pluvatakon

vekiĝis la formiko  
falintaj herbfolioj ĉirkaŭ ŝi mem  
pezege premis ĝis ŝi ja anhelis


ŝi elbaraktis el herbfolioj  
foriris de la grup' por serĉi l' elefanton  
ŝi volas al li diri sian voton

ŝi kredas sin sola amatin' por l' elefanto  
starante sur orelo lia

misprenis ŝi la tondron kiel sian ternon

ĉielo apartenas al mi, diris ŝi  
la tero apartenas al mi, ŝi aldonis,  
mi devas lokon ja okupi en arbaro!

oreloj senutilaj. li ankoraŭ apatiis  
kaj skuis sian kapon ĝuste ĉe ĉi-tempo  
senspuris la formiko kune kun allogo ŝia...



elĉinigis **Xu Wenlin**

**Tempo Fluas Kiel Akvo**

**Lou He**

torenta pluvo  
mi fermis la ombrelon sub alero  
por ŝirmi, en klimato sude de Yangzi-rivero  
sin trovis kelkaj homoj senmovema  
ja kiel skizo kontraŭ la arbaro malpliĝinta  
l' arbaro havas bluan sangon  
kun la fatalo nesondebla kaj teror' stel-nokta  
Oh, ne, obstino mia  
malsan' knabeca mia estas  
jen tempo fluas kiel akvo

en la aero ies fingr' moviĝis  
riparis mia patr' radiatoricevilo hejme  
radiaj ondoj pendis super la vilaĝo  
malplena satenaĵo  
aŭ melankolia nokta sonorilo  
jen flora branĉo malpeziĝis  
formalaj karno kaj burĝonoj  
la patro prenis ilojn, batis kaj martelis  
magneto sendis sonojn  
tro olda la kantisto  
elprenis karnan korpon li el tiu kanto  
jen tempo fluas kiel akvo

klasĉambre vic' kaj vico da lernantoj  
kaj intermita voĉ' de instruisto

